Dakapo

# "KIĈUARO" AL JUNULKURSO

adaptita laŭ

E V O L U I G A

D I D A K T I K O

Suplemento
de
La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
101 A 1975 1,25 FF

Antaŭparolo dediĉita al K-dino Déjean.

Kara Nikolin'

Aŭskultu, kion mi volas diri al vi !

Skribante ĉi tion, mi pensas pri blindulo, kiu povas vidi, ke pilko estas ronda (per la fingroj).

Jen du psikologiaj fenomenoj. Mi kvazaŭparolas per skribado kaj la blindulo per palpado kvazaŭvidas. Ni perceptas per niaj sentumorganoj.

Aŭskultu do, kion mi volas diri por enkonduki la temon "DIDAKTIKO". Ĉar vi estas instruistino, mi ne bezonas klarigi, ke la signifo de la vorto "didaktiko" estas arta vojo por instrui, sed la broŝuro celas ankaŭ servi al ĉiu ajn simpla esperantisto, tial necesas la difino.

Ĉiu esperantisto havas la rajton ĝui la feliĉon povi transdoni sian lingvokonon al aliuloj.

Plifaciligi la vojon per evoluiga instrumetodo estas la celo de ĉi tiu broŝuro.

Mi esperas, ke vi kaj multaj aliaj esperantistoj ŝatu tiun vojon, sekve ĝuu feliĉon pro ĝi.

Vilnovo, 19751111.

Kiĉuaro a. KIAL ?
b. KIEL ?

a. Por bone lerni lingvon necesas tuj rekte pensi en tiu lingvo.

Vera esperantisto estas nur tiu, kiu pensas esperantlingve. El psikologia vidpunkto la traduksistemo estas malbona, ĉar erariga metodo, do ne taŭgas por ke oni fariĝu vera esperantisto. Opiniante ĉi tion, oni devas apliki alian rektan vojon por esperantistiĝi, sekve jen la kialo de kiĉuaro, kiu estas la frazskemaro por enmemorigi lingvaĵojn, t.e. gramatikajn regulojn kaj vortradikojn.

Lingvaĵo vivas nur dank'al la skemoj, per kiuj ni pensas. Sen pensoskemoj lingvaĵo estas senviva. La rekta vojo postulas multfojan ripetadon de bone komprenitaj lingvaĵoj; ankaŭ skribe, ĉar la motora memorkapablo de la mano devas esti ekzercata, tamen oni konsilu la kursanojn, ke dum la skribado ili parolu laŭte, por ke la ekzerco estu kompleta : 2 pasivaj kaj 2 aktivaj formoj.

| | |
|---|---|
| aŭdi | legi |
| skribi | paroli |

b. Kiel apliki la rektan vojon ?

La lernanto bezonas plurajn kajerojn. Malkonsilinda estas unu dika kajero, ĉar en la daŭro de la kurso la kursgvidanto havu la eblon kontroli la komencan laboron pli detale.

Kiel uzi la kajerojn ? Ĉiu skemo (kiĉuo) havu apartan paĝon (foje 2 paĝojn - paro). Due oni verku horizontale, t.s. oni ne tuj plenigu la unuan, duan, trian ktp-ajn paĝojn, sed komencu per po unu frazo en unu tago sur paĝo. (( 5 x 1 plivaloras ol 1 x 5; ĉiun tagon studi po 5 minutoj plivaloras ol unufojan horon en semajno ))

Horizontale : La tasko por la lernanto estas fari 5 frazojn sub ĉiu skemtitolo post pritrakto de ĉiu leciono. Do de la unua leciono la tasko estas : 6 x 5 + la demandoj de la skemo 1.2, sumas 35 frazoj. Kompreneble la lernantoj rajtas fari kromajn ekzercojn, sed sur aparta

folio ekster la kajero.
Horizontale : Post la pritrakto de la dua leciono, la lernanto faru denove po 5 frazoj de tiu leciono, sed aldone unu frazon sub la skemojn de la unua leciono. Same okazu post la tria, ktp-aj lecionoj; per po 5 frazoj antaŭen kaj per po unu frazo ripeton de ĉiuj antaŭaj frazoj. Tiel oni ne perdas kontakton de la antaŭe lernitaj lingvaĵoj el la komencaj lecionoj.

La celo de la tasko estas, ke la kursgvidanto pritraktu la skemojn (kaj en tiuj skemoj estas gramatikaj reguloj aŭ aliaj lingvaj eroj), dum la lernantoj mem faru la enhavon de la frazoj helpe de la teksto de Junulkurso aŭ vortaro; prefere P.V. Se ne P.V. oni avertu la lernantojn, ke novajn vortojn el alia vortaro oni tuj apliku horizontale sur kiel eble plej da paĝoj. Ekz: SCIURO.
Tio estas sciuro (kiĉuo 1.1). Sciuro estas besto (1.2) La sciuro saltas sur la liton de Johanino (16.1) ktp. Ju pli multe horizontale, des pli firme la vorto estas enmemorigata rekte kaj la influo de la gepatra lingvo estas kiel eble plej eliminata.


En kurskunvenoj ĉiu kiĉuo tuj estas aplikata kiel konversaciekzerco (°)

Post la sesa leciono la kursgvidanto petas plenigi la unuan kajeron, por ke li povu kontroli ĝin hejme.

PS. Mi tuj aldonu, ke por fariĝi esperantisto ne sufiĉas la laboro en Kiĉuaro, necesas ankaŭ aliaj ekzercoj. Diktaĵoj, verkado de mallongaj tekstoj, aŭskultado de diskoj aŭ paroladoj, partopreni en konversaciaj ekzercoj (°), legi librojn, parkere lerni kantojn kaj rimfrazojn de poemoj, ktp.

------

# Evoluiga didaktiko




Lernu literojn per vortoj !
Lernu la vortojn per frazoj !
Lernu la frazojn per vivanta lingvaĵo.
Vivanta lingvaĵo havas kvar formojn :
du pasivajn kaj du aktivajn. Apliku tuj la 4 formojn !


| pasiva | aktiva |
|---|---|
| LEGI | SKRIBI |
| AŭSKULTI | PAROLI |

Komencu la studon per sinprezento !(Unua konversacia ekzerco en la kurskunveno)

| (( sur la tabulo ° )) | (( sur la tabulo ° )) |
|---|---|
| Mi estas Dakapo. | Mi estas .......... |
| Mi loĝas en Hago, NL. | Mi loĝas en ....... |
| Mi ŝatas instrui Esperanton | Mi ŝatas lerni Esperanton. |

La lernantoj skribu ĝin sur paperslipo, donu ĝin al la kursgvidanto kaj parkere, helpe de la skemoj sur la tabulo, la lernantoj inter si sinprezentu.


(°) N.B. Instrui sen tabulo estas malkonsilinde, ĉar vidi kreskantajn lingvaĵojn estas nepre necese. Tamen oni ĉiam atentu ne tro longe montri dorson al lernantaro; daŭrigu paroli dum la skribado kaj de temp' al tempo relegu la skribitaĵon. Zorgu ne perdi la personan kontakton.




Dua parolekzerco estas la numeraloj : unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, dekunu (ktp), dudek (ktp), tridek (ktp), cent, ducent(ktp) mil (ktp).

Ili taŭgas por ekzerci la prononcadon de 17 literoj : la 5 vokaloj a,e,i,o,u kaj 12 konsonantoj, inkluzive de la ŭ de la diftongo aŭ (naŭ). Por la ceteraj 11 literoj vi trovos vortojn en la teksto de la libro. Tamen tiujn vortojn oni uzu en frazoj, ekz. por lerni la literon ĉo, oni faru frazojn, en kiuj estas la vorto ĉevalo :

Tio estas ĉevalo (1.1) Ĉevalo estas besto (1.2)
La ĉevalo estas en la strato (2.7) La ĉevalo kuras(2.3)
La ĉevalo estas bruna (2.1) La ĉevalo estas utila besto (3.3) ktp.





Per la vorto KIO ? oni iniciatu la instruon de la substantivoj pere de frazoskemoj (vidu Unuan lecionon en Kiĉuaro p.12) Encerbigi la regulon kaj la substantivajn vortojn oni faru per frazoj. En la fino de la klarigado la konkludo rezultu, ke post demandoj komencitaj per KIO oni trovos vortojn finiĝantajn per O, sekve ili estas substantivoj.

Ni pensas per frazoskemoj, do por lerni pensadon en esperanto nepre necesas, ke per frazoj ni ekzercu por lerni (encerbigi, enmemorigi) la signifon kaj la karakteron de vortoj.

En ĉiu leciono la frazoskemoj (kiĉuoj) estas adaptitaj al la gramatika temo. La KIĈUOJ ebligas senlime ekzerci sen fari erarojn.

Cetere, fervora lernanto en kurso povas pligrandigi la ekzerclaboron, ne ĝenante la aliajn kursanojn. Ju pli da vortoj oni uzas por encerbigi regulon, des pli oni progresas en esperantistiĝo.





Per la vorto KIA ? oni iniciatu la instruon de la adjektivoj (vidu 2an lecionon Kiĉuaro) Por enmemorigi la regulon kaj la signifon de la adjektivoj (a-vortoj) oni agu kiel ĉe la o-vortoj.

Cetere, a-vortoj kvalifikas o-vortojn.
Ankaŭ ĉi tie valoras, ke ju pli da ekzerco, des pli da progreso, ĉar en la daŭra ekzercado de bone komprenita materio troviĝas la certeco pri la rekta vojo al esperantistiĝo.

<u>Ne forgesu la 4 formojn</u> de vivanta lingvo !

PAROLI – AŬSKULTI – SKRIBI – LEGI





¿ ?

Ĝenerala kutimo estas, ke post demando sekvas respondo. Kio estas tio? Tio estas tablo; Kio estas tablo ? Tablo estas meblo. Kia estas la tablo ? La tablo estas ronda. Kie estas la ronda tablo ? La ronda tablo estas en la ĉambro.
Taŭga ekzerco estas inversi la kutimon kaj prezenti jesajn frazojn, por ke la lernanto esploru kaj trovu la KI-vortojn aplikeblajn al tiuj frazoj; ekzemple :
"En la ĝardeno flugas tri belaj birdoj."

Kompreneble oni ankaŭ povas fari "Ĉu-demandojn".
"Ĉu tri belaj birdoj...ktp...? Ĉu flugas la tri... ?
Ĉu en la ĝardeno la tri belaj birdoj staras ? ktp.

Mi konscias, ke tiuj ekzercoj ne estas facilaj, sed por fariĝi esperantisto, kiu pensas en esperanto, necesas ankaŭ penoj.





F A R A S Tiun vorton oni metu sur la nigran tabulon por klarigi al la lernantoj, ke per la vorto "faras" en la frazoskemo :
"Kion la ...o faras ?" oni povas ekscii la signifon de la verboj.
Kion la tri belaj birdoj en la ĝardeno far<u>as</u> ? La birdoj flug<u>as</u>. Kion la ĉevalo far<u>as</u> ? La ĉevalo ir<u>as</u>. Kion la tablo faras ? La tablo staras. La horloĝo tiktakas. La

knabo manĝas. ktp.

La infinitivon oni lernu per duverbfrazoj. Ekz: Kion la ...o povas ...i ? La birdo povas kanti.

En la fino de la ekzerco oni akcentu la konkludon, ke la finiĝo AS indikas la tempon nunan kaj unufoje tio estas sufiĉa en sama frazo, do la I post la radiko estas infinitivo.

PS. Bedaŭrinde la pluralo estas pritraktata en la tria leciono, tial necesas tiam daŭrigi la klarigojn pri la verboj kaj montri, ke NE estas diferenco de la verba formo, kiam pluraj birdoj kantas, aŭ pluraj seĝoj staras.




K I E L ?

Rememorigu, ke per la vorto KIA oni petas informon pri la kvalito de iu aŭ io, sed por ekscii kvalifikon de la verbo oni devas demandi per "KIEL".
Kiel la birdo flugas ? RAPIDE flugas la birdo. Kiel la fraŭlino kantas ? Ŝi kantas bele. Kiel la sinjoro parolas? Li parolas laŭte. "Kiel ? ....e" estas la konkludo.
Bela birdo povas malbele kanti. Per tia ekzemplo oni klarigu, ke radiko + a estas adjektivo. Sama radiko + e estas adverbo.

Kia ...o ? resp: --...a ....o.
Kiel ...i ? resp: --...e ....i.

Evoluiga metodo ne neglektas gramatikajn regulojn, sed abunde uzas esperanton por aplike disvolvi praktikan kreskon de la lingvokono.




A N A L I Z A D O

En la kvina leciono ni trovu la okazon instrui frazoanalizadon, antaŭ ol pritrakti aliajn regulojn, do post la 4 kolorigitaj vortspecoj.
La a-vortoj, o-vortoj, i-vortoj kaj e-vortoj havas apartan

koloron. Tiujn vortojn oni tuj rimarkas en frazo.

Iniciatu la pritrakton per konversacio kun la lernantoj. Petu laùvice nomi verbon kaj skribu ĝin sur la tabulo. Ekz : STARAS. Due demandu : Kio staras ? respondo : La tablo. (Tuj substreku, sed ankoraù ne klarigu kial)

5 ekzemploj sufiĉas

| | | |
|---|---|---|
| La tablo | STARAS | (en la ĉambro) |
| La elefanto | iras | |
| La avo | sidas | |
| | estas | ... o |
| | estas | ....a |
| | estas | (troviĝas) |

mem aldonu trifoje "estas"

kerno de frazo = Subjekto + predikato

Klarigu, ke en frazo kiel : "La seĝo estas meblo" la du vortoj "estas ...o" kune formas la predikaton. Same : estas ...a, sed en la 3a okazo la vorto "estas" signifas "troviĝas", do estas memstara predikato.

Frazo kiel : "La tablo staras en la ĉambro" konsistas el 3 elementoj, nome: predikato, subjekto kaj komplemento.

La lernantoj ekzercu fari substrekadon de tekstoj en la ekzerckajero (horizontale). Daùre atentigu, ke predikato kaj subjekto estas kerno de frazo.

Ankoraù ne uzu transitivajn verbojn, do silentu pri rekta komplemento.

En la sama broŝurserio :

"Espéranto en 24 pages" : propaganda broŝuro por franclingvanoj, gramatika ŝlosilo, 1500-radika vortareto, kelkaj simplaj frazoj, utilaj adresoj... 1 FF

"Esperanto en 24 páginas": simila broŝuro por hispanlingvanoj ... 1 FF

"Initiation à l'Espéranto" (Kdo An Kaù) : verva enkonduko al la studado de esperanto, por franclingvanoj ...1,50 FF

"Du rêve à la réalité : l'espéranto": propaganda broŝuro por franclingvanoj, historio de la lingvo, argumentaro kun multaj ĝisdatigitaj ekzemploj (verkis : Kdo Henriko Masson) ...1,50 FF

Propagandaj flugfolioj por franclingvanoj :

1. Pourquoi les jeunes sont-ils contraints d'apprendre l'anglais ?
2. Pourquoi une langue internationale ?
3. Première leçon d'espéranto
4. L'espéranto au service des travailleurs

Ĉiu teksto (4 paĝoj en formato 21x15) ...0,06 FF

Afiŝeto (formato 21x29,7) por anonci inickunvenon : "Réunion publique d'information sur la langue internationale", kun loko por mane skribi daton kaj ejon kaj la adreso de la grupo ...0,06 FF

Mendojn ricevas : La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
pĉk : 3 374 04 M, Bordeaux.

Gérant & imprimeur: Baudé, 47340 Laroque

# GRAMATIKO

a s a v a po no po k i

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

La vortoj, el kio konsistas lingvaĵo ne nur havas difinan signifon, sed ankaŭ karakteron.
Kelkaj havas apartan koloron, t.e. ili estas tuj rekoneblaj.

1 unu vortspeco estas unika vorto, nome LA (artikolo)

2 alia vortspeco estas radiko + O (substantivoj)

3 tria vortspeco estas radiko + A (adjektivoj)

4 posta "" estas radiko + I (verboj)

5 la lasta en tiu vico estas radiko + E krom la vortoj kiel ambaŭ, hodiaŭ, ktp (adverboj)

6 sesa vortspeco estas memstaraj vortoj, kiuj anstataŭas substantivojn (vi,mi,ŝi,li,ĝi,ni,ili, oni, ktp) (pronomoj)

7 ciferoj estas la materialo, per kio la sepa vortspeco estas formata (numeraloj)

8 la memstaraj vortoj por fari komplementajn frazpartojn postulas apartan studon (prepozicioj)

9 La funkcion de konjunkcio oni lernu per ekzemploj en praktiko (konjunkcioj)

10 Same la vortspeco interjekcia estas lingva elemento, kiun oni encerbigu kiel alian vortradikon.

## A S A V A Po No Po K I

estas vorto por rememorigi la vortspecojn kaj kompreni la valoron konsciiĝi pri la 10 specoj.

# U N U A   L E C I O N O

1.1 Kio estas tio ?<br>
Tio estas ...o. (nur respondoj)<br>
1.2 Kio estas ...o ? - ...o estas ...o (dem. + resp.)<br>
1.3 Kio estas sur la ...O ? (nur respondoj)<br>
1.4 Ĉu la ...o estas ...o ?<br>
Jes, " " " (nur jesaj resp.)<br>
1.5 Ĉu la ...o estas sur la ...o ?<br>
Jes, " " " " " " } jesaj +<br>
Ne, sed la ...o estas sur la ...o } neaj resp.<br>
1.6 Ĉu ankaŭ la ...o estas ...o ?<br>
Ne, sed la ...o estas ...o. (nur neaj resp.)


# D U A   L E C I O N O

2.1 Kia estas la ...o ? (nur resp.)<br>
2.2 Kia ...o estas sur la ...o ? (nur resp.)<br>
2.3 Kion la ...o faras ? (dem. + resp.)<br>
2.4 Ĉu la ...o ...as ?<br>
Jes, " " " (nur resp.)<br>
2.5 Ĉu la ...o estas ...a ?<br>
Ne, sed la ...o estas mal...a (nur neaj resp.)<br>
2.6 Kion faras la ...a ...o ?<br>
La ...a ...o ...as. (nur resp.)<br>
2.7 Kio estas en la ...o ?<br>
En la ...o estas ...o. (nur resp.)

# TRIA LECIONO

3.1 Kio estas ...o kaj ...o ?
...o kaj ...o estas du ...oj.
3.2 Kiom da ...oj estas en la ...o ? ((vidu lec. 4a))
En la ...o estas ...(σ) ...oj.
3.3 Kia ...o ? - ...a ...o. (dem. + resp.)
3.4 Kiaj ...oj ? - ...aj ...oj. (dem. + resp.)
3.5 Kia estas vi ? Kia estas mi ? ((dem. + resp.
alterne komenci per VI aŭ MI, do : Kia estas vi?
Resp: Mi estas sana; kia estas mi ? Vi estas juna.))
3.6 Kiuj estas ...aj (dem. + resp.)
3.7 Kiuj ...as ? La ...oj ...as. (dem. + resp.)
(( por ekzerci la prefikson "ge" oni uzu la skemojn
3.6 kaj 3.7.)) .
(( ° numeralo, cifero))

# KVARA LECIONO

4.1 Kiel la ...o ...as ?
La ...o ...as ...e.
4.2 Ĉu la ...o ...as ...e ?
Jes, " " " " (nur jesaj resp.)
4.3 Kiu ...as ...e ? 
4.4 Kiuj ...as ...e ?  La ...oj ...as ...e (d+r)
4.5 Kiu besto ...as ...e ?
Najtingalo kantas bele.(nur resp.)
4.6 Ĉu (la) ...o estas ...isto ? (dem. + neaj resp.)
Ne, sed ŝi/li estas ...ant(in)o.

## K V I N A  L E C I O N O

5.1 Kion la ...o povas fari ? (( vidu paĝon 84))
5.2 Ĉu vi povas ...i ?
Jes, mi povas ...i.
5.3 Ĉu la ...o ...as ? Jes, ĝi ...as (dem.+ resp.)
5.4 Kie la ...oj..(°)..as ?
Ili ..(°)..as en ..(°)..ejo. (dem.+resp.)
5.5 Kia estas la ...o ? Ĝi estas ...a (dem.+ resp.)
5.6 Kiaj estas la ...oj ? Ili estas ...aj (d + r)

(°) sama radikvorto.

## S E S A  L E C I O N O

(prepozicioj)

6.1 Kie (la) ...o ...as ? (ĉe)
La ...o ...as ĉe la ...o. (nur resp.)
6.2 Kien (la) ...o iras ? (al)
6.3 Al kiu apartenas la ...o ? (al)
6.4 Kio estas inter la ...o kaj la ...o ?
La ...o estas inter la ...o kaj la ...o. (nur r.)
6.5 Per kio vi ...as ?
Mi ...as per la ...o.
6.6 En kio estas la ...o ?
6.7 Ĉu la ...o estas sub la ...o ?
Jes," " " " " " (nur jesaj r.)

## SEPA LECIONO (posedaj pronomoj)

7.1 Kies ? ŝi, li, ktp.
La ...o de mi estas mia ...o.
7.2 Kies ...o estas mal...a ?
Ŝia ...o estas malsana.
7.3 Kies ...o loĝas en ...o ? (de)
La amiko de Karlo loĝas en ...o.
7.4 Kies ...o estas sur la ...o de ...o ?
La ...o de ...o estas sur ŝia/lia ...o.

7.5 sur unu paĝo

| | |
|---|---|
| Kies ...o ? | Kies ...oj ? |
| Mia ...o. | Liaj ...oj. |
| ktp. | ktp. |

7.6 Kun kiu la ..o estas en ...o ? (urba nomo)
La knabo estas kun la patro en Parizo.

## OKA LECIONO

8.1 Kio estas ...eto ? Glaseto estas tre malgranda glaso.
8.2 Kio estas ...ego ? Hundego estas tre granda hundo.
8.3 Kiel la ...o ...as ? (vestaĵoj)
La ...o ...as sen ...o(j).
8.4 Kia estas la ...o de ni ?
Nia ...o estas ...a.
8.5 Kies ...oj estas ...aj ?
Iliaj " " "
8.6 Ĉu via ...o estas tie ĉi ?
Ne, sed mia ...o estas tie.

## N A Ŭ A   L E C I O N O (...n) tr. kaj netr.

9.1 Kion la ...o faras ? | Kion la ...o ...as ?
La ...a ..(tr.)(°) as. | La ...o ..(°) as ...on.(nur r.)

9.2 Ĉu la ...o ...as ...on ?
Jes, " " " " (nur resp.)

9.3 Kian ...on vi havas ?
Mi havas ...an ...on . (nur resp.)

9.4 Kies ...on li portas ?
Li portas la ...on de ...o . (nur resp.)

9.5 El kio konsistas la ...o ?
La ...o estas (konsistas) el ...o (nur resp.)

9.6 Kio estas ...aĵo ?
- ..(°) aĵo estas io el ...o.
de "
por "
, kion oni ..(°)..is.

(°)sama radiko.

## D E K A   L E C I O N O

10.1 Per kio oni ...as ? (oni)
Per la nazo oni flaras.

10.2 Kion oni faras per ...o ?
Per taso oni trinkas.

10.3 Kio estas ...ulo ?
- ...ulo estas iu, kiu estas ...a.

10.4 Kion tenas la ...o ?

10.5 Kiu manĝas la ...an ...on ?
La ...o manĝas la ...an ...on.

10.6 Kiom da ...oj la ...o ..(tr.)..as ?
La masonisto konstruas 8 domojn.

## D E K U N U A   L E C I O N O (is-as-os) kiam ?

11.1 Kion vi faris hieraŭ ?
Mi vojaĝis hieraŭ.

11.2 Ĉu la ...o ...is hieraŭ ?
Ne, la ...o ne ...is, sed ...is hieraŭ.

| | |
|---|---|
| 11.3 Kiu ..(tr).is hieraŭ ? | Kion ŝi/li ...is ? |
| La ...o ...is. | Hieraŭ ŝi/li ...is ...on. |

11.4 Kion vi faros morgaŭ ?
Morgaŭ mi ...os.

11.5 Kiam la ...o ...os ?
La ...o ...os morgaŭ ?

| | |
|---|---|
| 11.6 Kien vi iros morgaŭ ? | Kion vi faros en ...o ? |
| Mi iros al Parizo. | Mi vizitos la filmon en P. |

11.7 Kion la ...o faras nun ?
Hieraŭ la ...o ...is, morgaŭ la ...o ...os,
sed nun ŝi/li faras nenion.

## D E K D U A   L E C I O N O (horloĝo)

12.1 Kioma horo estas ?

12.2 Je kioma horo la ...o ...os ?

12.3 Kiam la ...o naskiĝis ?
La ...o naskiĝis je la ...a de ...o en 19..a.

12.4 Kiomope la ...oj ...as ?
(geknaboj) Ili iras multope.
(policistoj) Ili biciklas duope.

12.5 Kiom da ...oj havas ...o ?
Horo havas 60 minutojn.

12.6 Kiom estas la ...ono de ...o ?
La triono de naŭ estas tri.

## DEKTRIA LECIONO (Se ...us)

13.1 Kion vi aĉetus, se vi havus ...frankojn ?
Se mi havus mil frankojn, mi aĉetus ...on.
13.2 Kien vi irus, se vi havus ...on ?
Se mi havus ĉevalon, mi irus al kamparo.
13.3 Kion la ...o farus, se ŝi/li estus ...a ?
Se la knabo estus forta, li laborus multe.
13.4 Kion la ...o ordonas ?
La ...o ordonas : Haltu !
13.5 Kion ni faru ?
Ni kantu ! Ni vizitu teatron !
13.6 Kion vi vidas sur la bildo de la urbo ?

## DEKKVARA LECIONO (si-sia-sin)

14.1 Kion vi faras ? Kaj ŝi, li, ĝi, ili ?
Mi ...as min, kaj ŝi ...as sin.
14.2 Kun kies ...o ŝi/li promenis?(sia)
14.3 Kies ...on ŝi/li renkontos ? (sian)
14.4 Kiuj ...as sin ?
La ...oj ...as sin.
14.5 Kio estas ...ilo ?
\- (°)..ilo estas objekto (aparato) por ..(°)..i.
14.6 Per kio la ...o tenas sian ...on ?
14.7 Kio staras antaŭ la ...o ?

(°) sama radiko.

## DEKKVINA LECIONO

15.1 Ĉu la ...o estas tiel ...a, kiel la ...o? (d+r)
Ne, sed la ...o estas pli ...a ol la ...o.(du paĝoj)
15.2 Kiu estas la plej ...o de la ..(°)..o ?
La patro estas la plej dika de la familio.
15.3 Kiel rapide iras la ...o ?
La aŭtomobilo iras pli rapide ol la biciklo.
15.4 Kie estas la ...ujo ?
15.5 Kiu perdis sian ...ingon ? } (paro n.r.)
15.6 Kiu trovis ĝin ?

(°) familio, urbo, mondo, ktp.

## DEKSESA LECIONO ⟶ N

| | |
|---|---|
| 16.1 Kie estis la ...o ? | Kien ĝi ...as ? (paro) |
| La birdo estis en la ĉambro | Ĝi flugas en la ĝardenon |

16.2 Kien (al/sur kion) mi devas meti la ...on ?
Metu la libron sur la tablon.
16.3 Kia estis la vetero, kiam vi ...is ?
Pluvis, kiam mi promenis .
16.4 Pri kio ni parolu ?
Ni parolu pri (la) ...o ?
16.5 Pri kiu la ...o skribis ?
16.6 Kio estas tio ? (aro)
Tio estas ...aro.
16.7 El kio konsistas ...aro ?
- (°)..aro konsistas el (°)..oj.

(°) sama radikvorto.

## DEKSEPA LECIONO

17.1 Kio estas ...inta / ...anta / ...onta ...o ?

Fal<u>anta</u> folio estas folio, kiu falas.

17.2 Kio estas ...ita / ...ata / ...ota ...o ?

Ricevita letero estas letero, kiun oni ricevis.

17.3 Kia estas la ...o ? (ebla, ema, inda)

17.4 Kion vi nun faras ? (a - a)

Mi est<u>as</u> ...<u>an</u>ta.

17.5 Kion la ...o jam faris en la nuna momento ?

La ...o estas ...inta (a - i)

17.6 Kion li faris hieraŭ je la ...a (horo) ?

Je la 8a hieraŭ li est<u>i</u>s manĝ<u>an</u>ta (i - a)

17.7 Kion oni ĵus faris koncerne la ...on ?

La ...o estas ...ita. (a - i)

## DEKOKA LECIONO (ig + iĝ)

18.1 Ĉu la ...o estas ...a ? (d+r)

Ne, sed la ...o ...igos ĝin. (du paĝoj)

18.2 Kia la ...o fariĝis ?

La onklo dikiĝis.

18.3 Kio okazis koncerne la ...on ?

La ...o ...iĝis.

ekz: La sinjoro enmalsanulejiĝis.

18.4 Ĉu vi ŝatas la ...adon de la ...o ?

Jes/Ne, mi (ne) ŝatas la ...adon de la ...o.

18.5 Kiun laboron faras la ...isto ?

La ...isto ...as.

18.6 Per kio la ...isto laboras ?

## D E K N A Ŭ A   L E C I O N O

19.1 Po kiom da kilometroj en horo veturas la ...o ?
La trajno veturas po 100 km en horo.
19.2 Kiom kostas la ...o(j) ?
La brasiko kostas po ... centimoj.
19.3 Kiom pezas la ...o ?
La ...o pezas po ...(kilo)gramoj.
19.4 Kion vi vidis dum la vojaĝo ?
Vojaĝante, mi vidis ...o(j)n.
19.5 Ĉu la ... o estas manĝinta ? } paro
19.6 Kion manĝis la ...o ? }
Ŝi/li estas manĝinta ...on.

## D U D E K A   L E C I O N O

20.1 Al kiuj urboj la ...o volas vojaĝi ?

20.2 Kun kiuj landanoj la ...o volas korespondi ?

20.3 Kion semis la ...o ?

20.4 En kiu parto de la tero vivas ...oj ?
Eskimoj vivas en la norda parto.




P R E P O Z I C I O J

Por pritrakti prepoziciojn oni rememorigu la rilaton inter a- kaj o-vortoj, inter e-kaj i-vortoj.
Sur la tabulo skribu liston da po du o-vortojn, ekz.:

| | |
|---|---|
| tablo | ĉambro |
| libro | tablo |
| knabo | lernejo |
| vermo | pomo |
| ktp | |

Du o-vortoj ne senpere montras la rilaton. La tablo povus esti en, ekster aŭ destinata por la ĉambro. La libro povus kuŝi sur, sub aŭ fali de la tablo. La knabo povus esti en aŭ iri al la lernejo. Same vermo - pomo ne havus signifon, se oni ne aldonus prepozicion. Do jen la funkcio de prepozicio. Ĝi montras rilaton inter vortoj, kiuj per si mem ne tuj montras rilaton.




M I N E S C I A S

Sakoekzerco. La kursgvidanto kunportu ŝtofan sakon, en kiu la sekvaj objektoj : papero, volvita en la papero skatolo; en ĝi libro, en la libro koverto, en ĝi bildkarto kun poŝtmarko.
Demando al la lernantoj : Kio estas en la sako ?
La lernantoj ja ne scias, do gestas, ke ili ne scias.
Vi do unue instruu la bonan prononcon de la frazo :
Mines$^{t}$sias. ◡◡ — ◡ estas la frazmelodio kaj por faciligi la enmemorigadon oni skribu la kvar silabojn laŭ tiu frazmelodio |MI ◡| NES ◡| TSI —| AS ◡|.
Denove faru la demandon pri la enhavo de la sako, sed nun al unuopaj lernantoj. Ili do respondas per :
Mi ne scias.

Post sufiĉa ripetado vi prenu el la sako la paperon.
Dua demando : Kio estas en la papero ? Resp: Mi ne scias.

Vi flankenmetu la paperon.

Tria demando : Kio estas tio ? Resp: Tio estas skatolo. La vortoj SAKO, PAPERO kaj nun SKATOLO estu skribataj sur la tabulo.

Kvara demando : Kio estas en la skatolo ? Resp : Mi ne scias. Kaj tiel plu ĝis la lasta demando :

Kio estas sur la karto ? Respondo devas esti : Sur la karto estas poŝtmarko. Sed neniu scias la vorton. Kompreneble sonas denove : Mi ne scias.

Vi daŭrigu la konversacion en kontraŭdirekto per la demando : Kie estas la ...o ? Ekzemple, metinte la libron en la skatolon, oni povas demandi : Kie estas la poŝtmarko ? La respondo devas esti : La poŝtmarko estas sur la karto, la karto en la koverto, la koverto en la libro kaj la libro en la skatolo.
Metinte la plenan sakon sur seĝon, oni demandu :
Kie estas la sako ? Resp : sur la seĝo.

Kaj la daŭrigo estas : Kie la seĝo ? Kie ĉambro ? Kie la domo ? Kie la strato ? Kie la urbo ?
La lernantoj respondas per : minescias, dum la kursgvidanto skribas la vortojn sur la tabulo.
La urbo estas en la provinco, la provinco en la lando. La lando en Eŭropo. Eŭropo sur la tero kaj la tero en la firmamento.

Fina demando : Kie estas la poŝtmarko ? Kaj ridante la lernantoj sekvas la tutan vicon : La poŝtmarko estas sur la karto, en la koverto en libro kaj tiel plu ĝis en la firmamento.
Eble iu sagaca lernanto demandas al la kursgvidanto : Kie estas la firmamento ? Sekve la kursgvidanto devas respondi : Mi ne scias; kaj purigas la tabulon.

Ĉi-subaj prepozicioj aperis en la lecionoj 1-2-4-5. Oni avertu la lernantojn, ke ili bone lernu la esperantan signifon, ĉar tradukvorto ofte erarigas, tial ankaŭ ĉi tie tre grave estas lerni per frazoj.
La kursgvidanto atentu la novaperontajn prepoziciojn kaj preparu la instruon pri ilia signifo.

| | |
|---|---|
| Papero estas E N la sako | 2 C |
| poŝtmarko estas S U R la karto | 1 C |
| sako estas S U B la tablo | 5 C |
| Aventuroj D E Johanino kaj Karlo | 1 D |
| Mi deziras : Ĝ I S revido ! | 1 D |
| Vizito A L la insulo Marken | 4 D |
| Muzikanto E L bela ĉarma lando | 4 A |
| ludas P E R violono | 4 A |
| manĝas P O R vivi | 5 C |




En la naùa leciono oni pritraktu la akuzativon, sed pli frue oni devas ekzerci la scion pri transitivaj kaj ne-transitivaj verboj. Por iniciati oni petu al la lernantoj diri verbon. La kursgvidanto metu strekon sur la tabulo kaj dividu la diritajn verbojn laù tr. kaj netr. kategorioj.

| (°) | (°) |
|---|---|
| sidi | manĝi |
| stari | trinki |
| pendi | vidi |
| kuŝi | skribi |
| esti | legi |
| ktp | ktp |

(°) la indikon tr. netr. oni metu post kiam kelkaj vortoj aperis sur la tabulo.

La kursgvidanto klarigu, ke oni ne povas sidi ion, do ne transiras al alia objekto. Oni povas manĝi ion, do tio estas transitiva verbo.
Ne forgesu diri, ke kelkaj verboj estas jen tr. jen netr.; ekz. atendi. Oni povas atendi ion aù iun, do ĝi aù tiu estas atendata. Sed oni ankaù povas restadi en sama loko, do estas atendanta, sen ke temas pri iu aù io atendata.
La akuzativo estas simpla afero. Temas pri komplemento sen prepozicio.

Kiel ekzemplojn, uzu verbojn, en kiuj ambaŭ direktoj rekta komplemento povas esti aplikata : vidi, saluti, voki, tiri, mordi, ami.


| | |
|---|---|
| Mi vidas vin | Vin vidas mi. |
| Min vidas vi. | Vi min vidas. |

La knabo salutas la onklon.

La N signifas : "Atentu, tio estas komplemento, do estas la knabo, kiu salutas kaj la onklo estas salutata."

En la fina konkludo oni aldonu, ke la frazkonstruo estas libera. Oni eĉ povas komenci per la predikato, poste akuzativo kaj laste subjekto, sed malgraŭ ke la signifo restas sama, tamen estas konsilinde uzi la plej facilan formon, t.e.


subjekto ⟶ predikato ⟶ komplementoj.




R I P E T O pri la celo de Kiĉuaro. Post ioma enkonduko oni konversaciu helpe de kiĉuo. La konversacioj povas (devas) varii. Ekde la unua leciono ĉiu lernanto havu la okazon iniciati interparolon, ĉu al apuda najbara lernanto, ĉu al ĉiuj aliaj laŭvice. Inverse ĉiuj aliaj povas sin direkti al unu lernanto, por ke tiu respondu al ĉiuj. Krome oni povas varii per mallongaj komentoj. Ekz. en la dekunua leciono (kiĉuo 11.1) la demandito, anstataŭ tuj respondi la demandon, povas komenti per : "(Tio) ne tuŝas vin !" Pri sama kiĉuo. Post ebla respondo : "Mi laboregis hieraŭ", la demandinto povas komenti per : "Mi ne kredas (vin) !"

Jen pluraj etkomentoj aplikeblaj en konversaciaj ekzercoj: Mi ne scias; Povas esti; mi ne komprenas; komprenеble. Ankaŭ mi faris (opinias) tion; Prave; Certe; Eble; Dankon; Mi gratulas; Mi ĝojas: Tre interesa; Bedaŭrinde; Kompatinda ...o (18.3 Kompatinda sinjoro) ktp.

Resume : Kiĉuo faciligas mallongajn konversaciojn en la kurso kaj hejme ĝi estas la gvidilo por fari multajn manekzercojn enmemorigante regulojn kaj novajn vortojn.




Por iniciati la participojn mi uzas etan frazon :

Riĉa onklo

Tio signifas, ke ⟶ La onklo estas riĉa.


Falanta folio

La folio estas falanta

Diferenco estas nur, ke en la longa frazo la vorto "estas" markas nunan tempon, ĉar anstataŭ "estas" oni povas skribi "est<u>is</u>" aŭ "est<u>os</u>".

Poste oni same rezonu pri "Falanta folio" kio signifas, ke "la folio estas falanta". Ĉi-okaze la frazo ebligas ŝanĝi ne nur la tempon en la vorto "esti", sed ankaŭ la sufikso "anta" estas ŝanĝebla en "inta" aŭ "onta", sekve kreiĝas la eblo precizigi tempon per naŭ formoj : estas falanta; estis ...anta; estos falanta; estas falinta; estis ...inta; estos ...inta; estas falonta; estis ...onta kaj naŭe : estos falonta.

Ne ĉiuj formoj estas ofte uzataj. En leciono 17a mi uzis nur la (a-a) (a-i) (i-a)-formojn, sed komprenante tiujn, oni kapablas apliki ĉiujn dekok eblojn, do ankaŭ la naŭ pasivajn formojn, krom tio ili estas multobligeblaj per la vortoj "ESTU" kaj "ESTUS". Entute 30 formoj. La nura malfacilaĵo estas, ke oni logike pensu.




Konkludo.

Ĉar lingvostudo neniam havos finon, ankaŭ mi konscias, ke miaj verkaĵoj pri evoluiga didaktiko ne donas kompletan pritrakton. Ili estas nur kelkaj indikiloj. Volonte mi donas la eblon per korespondo respondi pri eventualaj nepritraktitaj lingveroj.

Sunangulo 19750122

